



Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

ALVOKO DE LA MONDA PAKONSILIO

La eksterordinara sesio (Helsinki, 20. XII. 1979) de la Buroo de la Prezidio de Monda Pakkonsilio alvokis al la monda publiko deklari sin kontraŭ la decido de NATO instali sur la teritorio de Okcidenta Eŭropo usonajn raketojn de mezdistanca flugo. Jen la teksto de la Alvoko:

„Estu forigita la danĝero de novaj usonaj raketoj!

Estis efektivigita grava atenco kontraŭ la afero de la paco. Malgraŭ la ekzistantaj favoraj kondiĉoj por stabiligo de la malstreĉiĝo kaj por la efektivigo de iniciatoj pri redukto de la armilaro kaj spite la vastajn internaciajn protestojn, precipe en NATO-landoj, la Konsilio de NATO akceptis decidon pri produktado kaj instalo de kvalite novaj usonaj nukleaj raketoj en Okcidenta Eŭropo.

Neglektante la proponojn de la socialismaj landoj pri tujaj intertraktoj, la NATO-gvidantoj elektis la vojon al plimultiĝo de la armilaro, por ke la estiĝinta ekvilibro de la fortoj estu rompita.

Esprimante la pensojn kaj la sentojn de milionoj da homoj, la Monda Pakkonsilio rezolute kaj kategorie kondamnis la decidon de NATO kiel plej seriozan minacon por la paco, la malstreĉiĝo kaj la estonteco de la homoj.

La vasta internacia protesta movado kontraŭ la raketa-nuklea rearmado de NATO ludas gravan, pozitivan rolon. Ĉiam pli granda nombro de ordinaraj homoj kaj politikaj agantoj konscias la danĝeron, kiun prezentas la decido de NATO. La ideo pri malstreĉiĝo firme obsedis mensojn kaj korojn de la homoj kaj neniu sukcesos konvinki ilin ke ili rezignu ĝin je la nomo de nova ciklo en la armkonkurado. La amasa kampanjo kontraŭ la usonaj raketoj en Eŭropo eniris novan, pli respondecan fazon.

Ni alvokas ĉiujn pacamajn fortojn aktivigi sian agadon kontraŭ la novaj raketoj de Usono en Eŭropo. La decido de NATO ne devas realiĝi! Kontraŭe, al tiuj ĉi misprojetaj planoj, la 80-aj jaroj devas fariĝi jaroj de atingado surbaze de egala sekureco, de interkonsento pri praktikaj iniciatoj pri fortikigo de la fido inter popoloj kaj ŝtatoj, pri ĉesigo kaj likvido de la armadkonkurado!

Por tiu ĉi celo la Monda Pakkonsilio alvokas la popolojn transformi la venantan 1980 en jaron de amasaj agoj por milita malstreĉiĝo.

Ni alvokas ĉiujn pacamajn fortojn engaĝi sin en la preparado por la Kongreso de la Monda Pakkonsilio en Sofio — 1980. La Monda Pakkonsilio kun duobligita energio firmigos la kunlaboradon inter ĉiuj, kiuj estas por la ĉesigo de la armadkonkurado. La liberigitaj homoj kaj materialaj fontoj devas esti utiligataj por likvido de la mizero, la malsato, la malsanoj, kaj la analfabeteco, kiuj daŭre estas peza sorto de centoj da milionoj da homoj.

Nel — al la novaj usonaj raketoj en Eŭropo!

Ĉesigon de la armadkonkurado!

Por malarmado kaj firmigo de la malstreĉiĝo!”

ALVOKO

DE LA VETERANOJ DE MILITOJ KAJ REZISTADO EL LA TUTA MONDO POR PACO PER MALARMADO

Maltrankviligite de la granda danĝero, kaŭzita de la vetarmado, ni, reprezentantoj de la veteranoj kaj suferintoj de la milito el ĉiuj kontinentoj kolektiĝis unuan fojon komune en monda renkontiĝo.

Atestantoj de genocido, viktimoj, funebro, suferoj kaj detruado, kaŭzitaj de la milito, la homoj, kiuj batalis ŝultron ĉe ŝultro, kaj tiuj, kiuj batalis unu kontraŭ la alia en sangoverŝaj konfliktoj, ni direktas al ĉiuj veteranoj kaj per ili al la tutmonda publiko kaj al ĉiuj registaroj insistan alvokon.

Fidelaj al la paco kaj sekureco de niaj propraj landoj, ni konfirmas la neceson haltigi la procedon, kiu povus venigi la homaron al neniiĝo. Ni rekomendas fari kontraktojn, celantajn limigon de la armado kaj subtenantajn realan malarmadon, garantiantajn je ĉiu etapo la sekurecon de ĉiuj.

La uzado de armiloj en la historio de la homaro estis unu el la rimedoj, kiujn la ŝtatoj ofte uzis por aranĝi la kontraŭaĵojn inter ili, kaj por iuj ankaŭ rimedo por disvastigo de ilia potenco. Ĉe la nuna stato en la mondo multaj homoj ankoraŭ opinias, ke posedo de potencaj armiloj kaj de militsupereco estas necesa por garantii la sendependecon, suverenecon kaj sekurecon de la koncerna lando.

Tamen hodiaŭ la akumulado de pli kaj pli neniigaj kaj perfektigaj armiloj prezentas pli grandan danĝeron ol defendon de la sekureco de la popoloj kaj de l'estonteco de la homaro. Ĉiuj landoj — membroj de UN konstatis tion dum la Eksterordinara Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado, okazinta de la 23-a de majo ĝis la 1-a de julio 1978 en Nov-Jorko.

Samtempe la vetarmado pliintensiĝas. La militbuĝetoj senĉese pligrandiĝas. La komerco pri armiloj atingas minacajn dimensiojn. Tio rezultigas disperdon de financaj rimedoj: teknologioj kaj homoj malprofite al la popoloj en la mondo kaj malrapidigon de la starigo de nova ekonomia ordo en la mondo, bazita sur justeco, egaleco en la rajtoj kaj devoj kaj sur la kunlaborado. Eĉ pli, tiu ĉi stato spegulas kaj pezigas la internacian streĉon, kontribuas al estigo de konfliktoj en la diversaj partoj de la mondo, haltigas la sereniĝon, plifortigas la antagonismon inter la militaliancoj, subtenas la malfidon kaj la senton de nesekureco.

Oni devas ĉesigi tiun ĉi procedon kaj ekiri laŭ vojo de malarmado. La problemoj de politika, milita, ekonomia, teknologia, psika karakteroj estas komplikaj. Ili altrudas intervenon de la publika opinio por kreo de komuna volo de la ŝtatoj, por ke la mondo ekmarŝu laŭ nova vo-

jo — laŭ la vojo de vera internacia sekureco kaj reciproka estimo.

La iompostioma realigo de tiuj taskoj postulas persistan kaj longan laboron kaj klopodojn, al kiuj invitas la Konkluda Dokumenta de la Eksterordinara Sesio de UN, emfazante, ke ĝenerala kaj plena malarmado sub efika internacia kontrolo, garantianta en ĉiu etapo la sekurecon de ĉiuj ŝtatoj, estas ebla.

Konsidere al tio estas necese, ke en internacia skalo, la ŝtatoj plenumu konscience la internaciajn devo-ligojn, kiujn ili subskribis, kaj apliku la principojn formulitajn en la Ĉarto de UN kaj en la Monda Deklaracio pri homaj rajtoj, pli speciale:

la rajto de ĉiu popolo sindifini, disponi pri sia sorto kaj pri siaj naturaj riĉaĵoj;

la rajto de ĉiu ŝtato, ĉu granda aŭ malgranda, ke ĝia suverenececo kaj netuŝebleco estu observataj sub koncernaj internaciaj garantioj;

la malpermeso uzi forton aŭ minacon solvi per forto la internaciajn konfliktojn kaj la sindevigo serĉi solvon de la malkonsentoj inter la flankoj: a) per intertraktoj; b) per internacia arbitracio; c) per aliaj rimedoj por paca aranĝo de la diskuteblaj problemoj;

rajto de ĉiu homo pri paco, digno kaj libereco; meti ekster la leĝojn ĉiun formon de rasismo, apartigado kaj de iuj ajn dokritnoj pri religia kaj rasa malamo inter la homoj.

Rompo de paco kaj krimoj kontraŭ la homaro devas esti punataj de internacia jurisdikcio, kies establo estas jam necesa.

Konsciante, ke la efikaj rimedoj pri nuklea malarmado kaj malebligo de nuklea milito staras sur unua loko, ni subtenas kaj alvokas, ke oni subtenu trastudon kaj efektivigon de ĉiuj specoj de efikaj rimedoj por nuklea malarmado, haltigon de la disvastigo de nuklearmiloj, malpermeson, ĝustigon kaj produktadon, kvalitan perfektigon de ĉiuspecaj armiloj por amasa neniigo.

Samtempe ni konsideras, ke estas necesa egalvalora kaj justa malgrandigo de la armitaj fortoj kaj de la klasika armilaro. En ĉiu etapo de akcepto de rimedoj por nuklea kaj konvencia malarmadoj la celo devas esti eviti ĉiun ajn rompon de la ekvilibro kaj garantii nemalgrandigitan sekurecon de ĉiu ŝtato aŭ grupo da ŝtatoj, resumante la armilojn kaj la armitajn fortojn al plejeble malalta nivelo.

Ni apelacias al aparta respondeco, kiun havas en tiu afero la plej forte armitaj landoj kaj la nukleaj fortoj, pli speciale la ŝtatoj — konstantaj membroj de la Konsilantaro por Sekureco ĉe UN.

Ni salutas la atingitan interkonsenton de Usono kaj Sovetunio pri limigo de strategia armado (la kontrakto SALT-2), ni deziras ties rapidan aplikon kaj la daŭrigon kaj evoluigon de l'intertraktado, kondukanta al gravaj kunordigitaj reduktoj kaj kvalitaj limigoj de la strategia armilaro. Ni konsideras ankaŭ kiel nepre necesan la atingon de pli vastaj interkonsentoj inter

ĉiuj interesitaj landoj, kiuj kondukos al analogaj akordigitaj limigoj, koncernantaj la taktikajn armilojn kun malgranda kaj mezgranda radiuso de efiko.

Ĝompostioma redukto de la militbuĝetoj kaj antaŭ ĉio fare de la plej forte armitaj ŝtatoj, sur la bazo de reciproka akordiĝo, kontribuos por limigo de la vetarmado kaj disponigos pli da ebloj por pligrandigo de la ekonomia kaj socia progreso en intereso de la subevoluantaj landoj, utiligante la rimedojn, kiuj nun estas destinitaj por militaj celoj.

●

Ni, kiuj pleje deziras la konstruon de mondo sen militoj, subtenos ĉiun paŝon antaŭen en tiu direkto kaj stimulos ĉiun provon, celantan la haltigon de la vetarmado kaj atingon de sukcesoj sur la vojo de la ĝenerala kaj plena malararmado sub efika internacia kontrolo.

Ni subtenos ĉiun iniciaton, kontribuante por profundigo de la sereniĝo kaj evoluigo de la internacia kunlaborado en la spirito de la Fina Akto de la konferenco en Helsinki, rilate la sekurecon kaj la kunlaboradon en Eŭropo.

Ni kondamnas la agreson sub iu ajn formo kaj batalos kontraŭ ĉiu propagando, kuraĝiganta la agreson kaj hegemonion super aliaj popoloj, ni subtenos la kreon de klimato de reciproka fido per interŝanĝo de opinioj, starigo kaj profundigo de la kontaktoj inter la civitanoj de ĉiuj landoj.

Ni deziras, ke oni kreu kondiĉojn por kunvoko de mondkonferenco pri malararmado, kiun antaŭvidas la Eksterordinara Sesio de UN.

Ni alvokas la registarojn estimi la devoligojn faritajn de ili mem en la konkluda dokumento de la Eksterordinara Sesio kaj, en la kadro de la interkonsentitaj proceduroj, ebligi rapidan efektivigon de la decidoj akceptitaj per komuna interkompreno.

Ni invitas la respondeculojn pri la informado, kaj ankaŭ la instruistojn atentigi pri la danĝero de la vetarmado kaj pri la neceso de reciproka, samtempa kaj kontrolata malararmado kaj kontribui por la venko de la obstakloj sur ilia vojo.

Ni alvokas la virinojn kaj la virojn kaj precipe la gejunulojn aliĝi al la komunaj klopodoj por kuna akiro laŭ novaj kaj senmilitaj vojoj.

Ni reprezentantoj de la veteranoj kaj suferintoj de la militoj, de la partoprenintoj en la rezistado kaj de la deportitoj, invalidoj, militkaptitoj, partoprenintoj en la militoj porlibereco kaj sendependeco, venintaj el 54 landoj de ĉiuj kontinentoj, konsciante nian respondecon kaj moralan forton, kiu konsistas en nia komuna volo, ni neas la neeviteblecon de la milito.

Ni estas por malararmado!

Fidante jela estonteco de la homaro, ni ne volas lasi alla sekvantaj generacioj mondon de militoj, de ruinoj kaj morto.

Ni konfirmas nian volon kunlabori por la konstruo de mondo de vivo, progreso kaj justeco, estimanta la liberecon kaj la dignon de la homa personeco.

Evgenija Kiranova
sekretariino de la Monda Packonsilio

BATALO POR PACO — BATALO POR HOMAJ RAJTOJ

La batalo por defendo de la homrajtoj estas neapartigebla dis de la batalo por paco, kaj la batalo por paco kaj sekureco, por socia progreso estas fakte batalo por defendo de la homrajtoj. Tiu ĉi koncepto kuŝas en la fundamento de la ĉiam pli kaj pli vastiĝanta agado de la Monda Packonsilio (MPK) kaj por defendo de la homrajtoj, kiu okupas centran lokon en la ĉiujare adoptata de ĝi agadprogramo.

Nenio lezas tiel amase kaj brutale la homrajtojn, kiel milito kaj preparo mem por milito, koloniisma kaj novkoloniisma premo, rasismo kaj faŝismo, malsato, mizero. Ĝuste tial la batalo de MPK por ĉesigi la militkonfliktojn, por defendi kaj profundigi la komenciĝantan proceson de sereniĝo, por haltigi la vetarmadon, por likvidi la rasistajn, diktatorajn, faŝistajn kaj novfaŝistajn reĝimojn estas fakte batalo por defendi la homrajtojn. En multe da internaciaj renkontiĝoj kaj en vico da dokumentoj MPK esprimis sian principan starpunkton, ke paco, paca kunekzistado kaj reciproka kunlaboro, likvido de koloniismo kaj rasismo, forigo de ĉiuspeca diskriminacio estas premisoj, kiuj povas krei la necesajn favorajn kondiĉojn por demokratia evoluado tiel en la kadro de la apartaj landoj, kiel en internacia skalo.

Lastatempe ni estas atestantoj de ĉiam pli kaj pli insistaj provoj de la imperiismaj centroj transformi la noblan ideon pri protekto de la homrajtoj en sian armilon por enmiksiĝo en la internajn aferojn de la socialismaj landoj kaj de la landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, ekirintaj laŭ la vojo de la revoluciaj transformoj. La imperiisma propaganda maŝino cirkuligas senprecedentan nombron de elpensajoj kaj kalumnioj, ŝveligante unuopajn kaj plej ofte nepruvitajn okazojn de leĝrompoj en tiuj landoj. Samtempe ili ne „rimarkas”, preterlasante tian “bagatelan faktan”, ke pro kulpo de la imperiismo kaj koloniismo, de la efektivigata plej senskrupula ekspluatado kaj prirabo de tutaj landoj, en la hodiaŭa jarcento de scienc-teknika progreso, superanta la homan fantazion, 50% de la loĝantoj de nia planedo suferas pro subnutrado kaj malsato, milionoj da homoj estas plene analfabetaj kaj en multaj landoj ĉiam ankoraŭ daŭras la ekzistado de mezepoka malegaleco inter viro kaj virino.

Sed, batalante decide por paca estonteco de la homaro, por ĝia sekureco kaj socia progreso, la Monda Packonsilio aplikas plej aktive ankaŭ specifan agadon, direktitan kontraŭ konkretaj

kaj krudaj malobservoj de la homrajtoj, defende al persekutataj pacbatalantoj, nacia sendependeco, socia progreso. Bedaŭrinde, la okazoj de plej kruda malobservado kaj subpremo de tiuj rajtoj estas tre multaj. En sia penado haltigi la iradon de la historio kaj en sia senhelpa malico pro la antaŭeniĝo de la progresemaj kaj pacamaj fortoj en la mondo, la internacia imperiismo kaj la reakciaj fortoj en apartaj landoj ne hezitas uzi plej reprezaliajn kaj kruelajn rimedojn. En certaj landoj tio atingas ĝis genocido.

En la Sekretariejon de la Monda Packonsilio alvenas multnombraj raportoj, leteroj, telegramoj kaj perbuŝaj informoj pri senpostsigne malaperintaj pacbatalantoj, pri arestoj, torturoj kaj murdoj, Ekde sia fondiĝo ĝi sekvas kun maltrankvilo kaj reagis rapide al okazoj de malobservo de la homrajtoj, kie ajn ili estas. Kaj ĝis nun ne estis okazo, kiam ĝi ne respondis al la peto eĉ de unu serĉanto de helpo. Ĝi agas laŭ la neceso — per specialaj deklaroj kaj alvokoj al la Komisiono de UN pri homrajtoj, per agado, celanta vastan mobilizon de la monda publika opinio, per protestmanifestacioj, petskriboj, per organizo de specialaj kunsidoj de pacbatalantoj el difinita regiono, lando aŭ mondscale.

Ekde ses jaroj eĉ la Monda Packonsilio funkcias Konstanta Komisiono pri homrajtoj. Tiu ĉi mallonga periodo de ĝia ekzistado estas plenigita de riĉa agado — regulaj aŭ specialaj sesioj, dediĉitaj al demandoj pri malobservo de homrajtoj en difinita lando, sendado de delegacioj, celantaj kolekti donitaĵojn pri malobservo de homrajtoj, kampanjoj por liberigo de politikaj malliberuloj, kampanjoj por esploro de la sorto de senpostsigne malaperintaj aŭ forkaptitaj homoj. Grandega estas la nombro de publikaĵoj, protestaj telegramoj, leteroj kaj petskriboj, adresitaj al registaroj, UN, al internaciaj organizoj defende al la persekutataj batalantoj por paco, demokratio kaj sociala progreso.


La Konstanta Komisiono pri Homrajtoj de la Monda Packonsilio okazigis ankaŭ specialajn sesiojn, en kiuj estis prezentitaj multe da dokumentoj kaj estis aŭskultitaj atestoj pri kruda malobservo de homrajtoj en Haitio, Salvadoro, Nikaragvo (dum la tempo de la diktatoro Somoza), Gvatemalo, Urugvajo. La lasta sesio, okazinta en Bazelo, estis dediĉita al Gvatemalo kaj Urugvajo. Mi permesos al mi doni kelkajn ekzemplojn nur el la grandega skriba kaj perbuŝa pruvmaterialo, prezentita en la sesio pri Urugvajo. Urugvajo hodiaŭ estas lando kun plej alta procento da malliberuloj en la mondo — unu malliberulo el 400 ĝiaj loĝantoj. Funkcias specialaj centroj por torturado de arestitoj. Speciale trejnita militrupoj efektivigas intencajn murdojn de kamparanoj. Al sistemaj reprezaliaj kaj neniigoj estas submetataj sindikataj gvidantoj, intelektuloj kaj religiaj oficistoj. Ekde 1966 ĝis nun oni faris pli ol 30 mil politikajn murdojn de laboristoj, kamparanoj, progresemaj intelektuloj. Pri Gvatemalo ni ricevis nur longajn nomarojn de murditaj. La raporto pri la

laboro de la sesio estis sendita al la UN-Komisiono pri Homrajtoj. Oni decidis eĉ la Konstanta Komisiono pri Homrajtoj de la Monda Packonsilio krei subkomisionon pri Urugvajo, kies taskoj estas labori por ĉesigo de la reprezaliaj kaj torturoj, por amnestio de ĉiuj politikaj malliberuloj, por serĉado kaj liberigo de la forkaptitaj personoj, por la rajto de sendanĝera reveno hejmen de la politikaj elmigrintoj. Koncerne Gvatemalon oni decidis diskonigi al la monda politika opinio la prezentitajn faktojn, postuli oficiale de la registaro ĉesigi la reprezaliajn, malfondi kaj malpermesi la bandojn de dungitaj murdistoj kaj permesi al la internacia komisiono viziti la landon kaj studi surloke la situacion.

Enketa komisiono de la Monda Packonsilio vizitis ankaŭ Nordirlandon, kie ĝi kolektis riĉan pruvan materialon pri la malobservoj de la homrajtoj fare de la brita aŭtoritato. La Konstanta Komisiono pri homrajtoj de MPK okazigis kelkajn kunsidojn kaj sendis komisionon en Federacian Respublikon Germanio por kolekti informojn lige kun la aplikado de reprezaliaj metodoj rilate al progresemaj personoj, konata sub „malpermeso apliki profesion“. La komisiono kondamnis tiun ĉi praktikon.

Oni klopodas, ke la agado de la Monda Packonsilio defende al la homrajtoj fariĝu ĉiam pli efika kaj rezulta. Tio havas decidan signifon. Ĝar la batalo por paco kaj internacia sekureco estas batalo defende al la homrajtoj, batalo por forigo de diskriminacioj, teroro, reprezaliaj, neniigo de homa vivo, por fortikigo kaj konstruado de justa kaj daŭra paco.

El la bulgara: D. Haĝiev



Por la homaj rajtoj — levu la manojn!

Promenado en la infaneco

Rajna Konstantinova

Mia bileto validis ĝis la lasta stacidomo de nia patrujo — la kongresurbo Varna. Por mi tio estis unua vojaĝo post dekoj da jaroj. Kiam en la frua mateno la trajno haltis ĉe la stacidomo de mia naskiĝurbo Sumen, kiam mi legis kaj aŭdis la konatan nomon kaj kun larĝe malfermitaj okuloj vidis la modernan novan stacidomon, mi ne povis kontraŭstari al la tento interrompi la vojaĝon por unu tago. Mi lasis la valizon ĉe la deponejo, validigis la bileton kaj dronis en la pasinteco. . . en la urbo de mia infaneco. . .

Tuj el lastacidomo mi eniris la grandan urban ĝardenon. Freŝa malvarmo karesis mian vizaĝon. Tie preskaŭ nenio ŝanĝiĝis, nur la arboj maljuniĝis per kelkdeko da jaroj. Kvazaŭ hieraŭ mi rapidis sur tiu larĝa aleo, kun valizeto kaj mantelo enmane, kaj envagoniĝis en la grandan nigran trajnon — la trajnon de la espero — por serĉi aliloke la perditan feliĉon. . . Sed mia koro evidente restis en tiu ĉi kvieta, ĉarma provincurbo. Dum tiu unutaga promeno mi decidis malrapide trairi ĝin, de la komenco ĝis la fino, t.e. de la stacidomo ĝis la majesta, centjarojn aĝa arbaro „Kjoŝkove“ kaj returne al la stacidomo.

Dekstre de la ĝardeno mi vidis larĝan legomĝardenon kaj malantaŭ ĝi — milojn da flavvizaĝaj heliantoj. Kaj ili funkciigis la meĥanisman de la rememoroj. . .

Mi estis tiel malgranda, ke mi nun apenaŭ rememoras, sed iuj travivaĵoj por ĉiam gravuriĝis en mian memoron. Orfa infaneco! Dum la ferioj ĉiuj ni — kvar fratinoj — laboris diversloke por gajni iom da mono por lernolibroj kaj deca vestaĵo dum la lernojaro.

El mia plej dolĉa matendormo vekas min frapado sur la malaltan fenestreton kaj la energia voĉo de nia najbarino: „Nu, infano, ni iru!” Mi beate oscedas, turnas min sur la alian vagonon, iu mola mano kvazaŭ karesas miajn fermittajn okulojn kaj iu flustras: „Dormu, infano, dormu, la suno ankoraŭ ne leviĝis. . .” Ho ne, mi ne rajtas plu dormi, mi devas iri al laboro!

Mi rapide ellitiĝas, metas sur nudajn piedojn sandaletjn, ĵetas manplendon da malvarma akvo sur mian vizaĝon, surmetas robon de indieno (presita katuno) kaj blankan kaptuketon kaj kuras por atingi la rapide marŝantajn kaj laŭte klaĉantajn najbarinojn.

Ni iras al la legomĝardeno. Oni devas tre frue kolekti la maturajn legomojn, antaŭ ol la suno varmigis ilin, por elmeti ilin al la bazaro. La

virinoj kliniĝas konstante, sed mi estas tiel malalta, ke mi kolektas la ruĝajn tomatojn kaj verdajn paprikojn starante. Kun kia plezuro mi formanĝus unu rosbanitan tomaton! . . . Sed la akraj okuloj de la aĉa kontrolisto trapikas min de malproksime, kvazaŭ li legus miajn pensojn. . . Venas la duradaj ĉaroj kaj transportas la plenajn kestojn al la bazaro, kie jam ilin atendas fruvekiĝemaj dommastrinoj.

Kaj ni direktiĝas al la granda helianta kampo, kiu apartenas al la sama labordonanto. Meze de la kampo troviĝas la „draŝejo”. En ĝia centro estas amasigitaj la rikoltitaj helianto-kapoj. Ni sidiĝas ĉirkaŭe, rekte sur la teron, kaj komencas degrajniĝi ilin, frapante per dikaj mallongaj frapiloj. La sengrajnigitajn kapojn ni ĵetas malantaŭ niaj dorsoj. La sama aĉa kontrolisto, kun pala vizaĝo kaj supren pintigitaj nigraj lipharoj, iras ĉirkaŭe, frapas siajn glacedajn botojn per vipeto kaj lerte kraĉas tra la dentoj. Se la vento revenigas la kraĉaĵon sur lian boton, li diligente frotas kaj purigas ĝin sur sian rajdpantalnon. Li amindumas kun la junaj laboristinoj kaj lia voluptema rideto malkovras flavajn, difektitajn dentojn. Mi intuicie timas lin. Nur kiam li forestas aŭ staras dorsflanke, mi lasas por momento la frapilon kaj blovas en miajn etajn manplatojn, kovritajn per krevintaj vezikoj. Vespere ni viciĝas apud lia pavilono por ricevi la tagsalajron: du levojn por la virinoj, unu levo por la infanoj. Ho, kiel mi ĝojis pri tiu levo*, kiu ĉiuvespere ektintis en la skatoleto, ĉe la aliaj peze ellaboritaj levoj, destinitaj por la nova lernojaro. . .

Mi klare memoras — estis varmega tagmezo. Zenita suno senkompate trovarmigis miajn vizaĝon kaj kapon eĉ tra la blanka kaptuketo. Subite mi eksentis fortan frapon sur la kapon kaj kelkaj grajnoj surŝutetis mian vizaĝon. Timigite mi eksaltis. — Antaŭ mi staris li, kun vizaĝo malbeligita pro malico, frapis per granda helianto-kapo miajn manojn kaj kolere kriaĉis al la virinoj: „Pro kio vi trenas kun vi tiujn infanaĉojn, kiuj nur damaĝas al la ĉefo! Kio rezultus, se ĉiuj lasus po tiom da grajnoj neeligitaj? Hodiaŭ ŝi ne ricevos tagsalajron!” El mia nazo fluis sango, mi senkonsole ploris, ĉar fakte mi multe klopodis kaj eĉ per fingroj eligis la semojn, kiuj estis kaŝitaj sub la krudaj, forte fleksitaj petaloj. Pro tio miaj fingroj estis ĝissange

* Levo — bulgara monunuo

skrapitaj kaj tiel doloris... La najbarino apud mi, kiu ĉiumatene vekis min, energie ekkriis:

— He, sentaŭgulo, lasu do la infanon trankvila! Ŝi klopodas eĉ pli ol ni. Nu, vidu mem kia kruda kaj fleksita estas tiu ĉi helianto-kapo. Kaj kontrolu malantaŭ ŝia dorso, ĉu estas multaj nesufiĉe sengrajnigitaj heliantoj!

— Silentu vi, klaĉulino, por ke mi ne senigu ankaŭ vin de tagsalajroj!

— Nu-nu! Provu nur!

— Vi ne timigos min! Ja via edzo ne gardos vin el la malliberejo!

— Mia edzo estas en malliberejo, ĉar li batalas por justeco. Sed kiam li eliros, vi okupos lian lokon, ĉar vi estas maljusta!

Kaj tiel ĉiutage tiu aroganta fripono insultis infanojn kaj virinojn, senigis ilin de la mizeraj tagsalajroj. La pli energiaj kontraŭparolis, defendis siajn rajtojn. La pli timemaj tiris malsupren la blankajn tukojn, klinis la kapojn super la krudaj heliantoj, kaj frapis, frapis...

Ĉe krepusko, post preskaŭ dekdu-hora labortago, ni malrapide reiris hejmen. Antaŭ miaj lacaj, polvoplenaj okuloj turniĝis oraj helianto-kapoj, kiuj fariĝis ruĝaj kiam mi fermis la okulojn. Mi sentis vomemon, la manoj kaj la kapo doloris, kaj kvazaŭ iu granda funelo senĉese elŝutis el la ĉielo heliantan semon. Ĝi kovris min la tutan, mi kvazaŭ paŝis sur ondoj de helianta semo. Mi kontrolis la vojon kelkajn metrojn antaŭ mi, fermis la okulojn kaj tiel faris kelkajn paŝojn, morte laca. La najbarino tuŝis mian ŝultron kaj komplate flustris: "Povra infano, ŝi preskaŭ dormas!... "Mi havis nur unu helan penson en la kapo: en mia naztuketo, malpura pro ŝvito, sango, helianta rezino, kuŝis la benata malgranda levo...

La legoma kaj la helianta ĝardenoj restis malantaŭ mi. Mi jam marŝis sur la ĉefstrato de mia naskiĝurbo. Neniu el la frupasantoj rekonis min. Kaj jen — mi preterpasas nian gimnazion! Larmoj plenigas miajn okulojn ĉe la rememoro pri miaj mizeraj kaj suferoplenaj lernejanaj jaroj... Mi ĉiam uzis la vestojn de miaj pli aĝaj fratinoj, malsatis, lernis vespere el fremdaj lernolibroj sub la pala lumo de petrollampo aŭ eĉ olelampeto, sed kun kia ĝojo kaj ekstazo mi ĉiutage eniris tiun templon, plej sankta figuro en kiu por ĉiam restis mia klasestrino Pagona Ĉalâkova!

Mia vojo kondukas min ĝis la "Kruta strato" — mia naskiĝstrato! Kiom ŝanĝita estas ĉio en ĝi! Vane miaj okuloj serĉas la kadukajn dometojn kun pitoreskaj florgardenoj kaj plektobariloj, trans kiuj ĉiuj konis kaj helpis unu la alian. Sur la loko de la lernejo, kiun mi vizitadis, leviĝas moderna konstruaĵo — la urba radio-stacio. Eĉ tie, kie estis nia modesta dometo, nun leviĝas trietaĝa domo de mia fratino kaj ŝiaj gefiloj. Mi rapide preterpasas kaj troviĝas sur la periferia fervojo, kiu servas la bierfabrikon. Nun, kiel en la tempo de mia infaneco, ambaŭflanke fajreras pecoj de rompita bierboteloj. Mi kaŝrigardas,

ĉu iu observas min, kaj — kiel tiam — prenas enmane pli grandajn vitropecojn kaj rigardas tra ili kontraŭ la sunon. La mondo tuj transformiĝas en verdan kaj oranĝkoloran oazon...

Rapide, rapide antaŭen, ĉar la tempo ne sufiĉos por la pilgrimo en la por mi sanktaj lokoj de mia infaneco!

La periferia fervojo kondukas min al la rando de la urbo kaj de tie mi eniras la majestan folioričan arbaron, en kiu eĉ la aero aspektas verda. Mi paŝas sur la sama kiel tiam kruta arbara vojeto.

Kiomfoje, aŭtune kaj printempe, mi venis kun panjo tien ĉi por kolekti sekajn branĉetojn por nia malalta lada forneto! Dum panjo amasigis la branĉetojn, mi kolektis printempajn florojn: etajn sovaĝajn ciklamenojn, flavajn krokusojn, blankajn galantojn. Granda estis mia ĝojo, kiam mi trovis ankaŭ bonodorajn violetojn, kaŝitajn sub la arbustoj. En sia strebo al vivo kaj lumo, iuj floroj estis trapikintaj la brunajn pasintjarajn arbofoliojn kaj subtile pitoreskis sur ili... La amara odoro de mortaj folioj kaj la freŝa, viviga aromo de humo kaj printempaj floroj faris min ĉiam iel triste-feliĉa... Mi aŭdas panjon diri: "Nu, infano mia, mi estas preta!" Sur dika ŝnuro estas atente ordigitaj sekaj branĉoj kaj sur ilin metita dika ŝtofo, por ke ili ne vundu mian dorson. Obeeme mi ekkuŝas sur ili, panjo ligas la ŝnuron ĉirkaŭ miaj ŝultroj. Poste ŝi faras la samon kun si kaj ni ekmarŝas al nia malriĉula hejmo. Ni estis feliĉaj, se ni sukcesis atingi ĝin senobstakle. Ĉar iam subite ekstaris antaŭ ni la forstisto kaj ordonis, ke ni malligu la ŝnurojn kaj metu la lignaĵon surteren. Pro kio? — Ĉar ofte edzoj kaj filoj de aliaj virinoj iris dum la nokto en la arbaron, forhakis iun arbon, tranĉpecigis ĝin, kaj poste la virinoj maskis la pecojn per sekaj branĉoj. Tiam lignaĵon la forstisto ĉiam konfiskis kaj faris protokolon por monpuno. Ĉe ni tio neniam okazis, ĉar ni ne havis viron hejme, kaj ĉar panjo estis tro honesta kaj timema por fari ion ajn kontraŭleĝan. Sed kiom multe kostis al ni la denova ligado de la branĉoj...

El tiuj tristaj rememoroj eltiras min mallaŭta, delikata plaŭdeto de arbara torento. Kaj jen mi staras antaŭ la arĝentakva fonteto, nomata "Lavĉeto" (Leonido). Ĝia akvo nun, kiel en mia infaneco kaj de nememorebla tempo, klukklukas kaj fluas malsupren en formo de arbara torento. Kaj ĉirkaŭe! — vera tapiŝo el buntaj ĉifonetoj kaj fadenoj, forte alkroĉitaj al la arbustoj. Vera panoramo de homaj tragedioj kaj espero, fido al la ĉiopova naturo. Ĉiu ŝtofpeceto estas saturita je larmoj kaj preĝoj por resaniĝo de karaj malsanuloj.

Mi vidas verdan ĉifoneton, iom senkolorigitan de la jaroj. Per la fadenoj de la rememoroj alnaĝas al mi la fora printempa tago, kiam ankaŭ mi venis tien ĉi kun panjo por serĉi savon... Post frostiĝo dum unu neĝblovado mi grave malsaniĝis. Reŭmatismo kaj kormalsano katenis

min al la lito. La malsano similis infanan paralizon. Miaj ostoj fariĝis molaj. La kolo maldikiĝis kaj ne plu povis subteni la kapon, kiu senforte kliniĝis al la ŝultroj. Miaj okuloj estis preskaŭ ĉiam fermitaj. Panjo aplikis popolan medicinon kaj vere, kiam la printempo venis, mi komencis necerte paŝi, kiel eta bebo. . . Unu tagon — la tagon de Sankta Georgo — panjo vekis min frue. vestis min en mia nova verda robo, eltranĉinte anticipe pecon de ĝi, kaj ni ekmarŝis laŭ la periferia fervojo al la arbaro. Post la peza malsano mi ĝuis la freŝan aeron, la varmon de la majaj sunradioj, kiuj kvazaŭ karesis mian konsumiĝintan korpon. Antaŭ kaj malantaŭ ni marŝis ankaŭ aliaj virinoj kun malsanaj infanoj, ĉiuj portante kun si la esperon, ke la arĝentaj akvoj de "Lavĉeto" forportos la malsanon en la fundon de la arbaro. . . Kiam venis nia vico, panjo lavis mian vizaĝon per malvarma akvo, krucsignis, etendis manojn kaj fiksis la verdan ĉifoneton al la plej prokisma branĉeto, kaj ekflustris: "Sankta fonteto, liberigu mian infanon de la malsano! Faru, ke ĝi denove senzorge kuru kiel viaj benataj akvoj! . . ." Mi ankaŭ krucsignis kaj trinkis el la pura arĝenta akvo. Revenante hejmen, mi marŝis pli kuraĝe. Ja kion ne faras la forta kredo! . . .

Tra la verda foliaro jam penetris oranĝaj radioj de la subiranta suno. Mi devis rapidi, por ne ellasi la vesperan vagonaron. Laŭ la periferia fervojo mi atingis la stacidomon, plenumis la formalajojn, envagoniĝis kaj dum kelkhora veturo ĝis Varna mi ripozis de tiu kvindek-jarojn longa promeno en la infaneco. . . Kaj mi meditis:

La kuranta jaro estas proklamita „Internacia Jaro de la Infano". Kiom diferenca de mia infaneco estas tiu de la nunaj infanoj kaj de miaj geinfanoj kaj genepoj! Ili naskiĝis ĉe aliaj kondiĉoj. Kiom multe la ŝtato zorgas pri ili! — Sunaj infanĝardenoj, helaj lernejoj, senpaga instruado, studado en Superaj Lernejoj laŭ la dezirata specialeco, senpaga kuracado, sufiĉaj pagitaj forpermesoj, feriado en ripozlokoj, pensioj por la gepatroj! Ĉu iam mia malriĉa patrino povus eĉ sonĝe revii pri io simila? Ĉu iu subtenis ŝin, kiam ŝiaj infanoj malsanadis kaj mortis, kiam ŝi tagnokte laboris por nutri ilin? Nun la infanoj travivas komforte sian infanecon, ludas ĝissate, ĝuas la vivon.

Kiam mia nepino petas, ke mi rakontu al ŝi fabelon, mi rakontas pri mia propra infaneco. Ŝi aŭskultas kun larĝe malfermitaj okuloj kaj diras: Kia malgaja fabelo! . . .

Rimarko: La verko estas premiita en la Belartaj Konkursoj — porinfana literaturo — dum la 64a UK de Esperanto en Lucerno 1979, per la titolo "Nova talento" kun gravuro de la nomo de la aŭtorino sur pokalo "Harabagi". Ni ĝin presigas kun permeso de UEA.

KURIOZAJOJ

La plej malgranda Stato

Malmultaj homoj scias, ke la plej malgranda sendependa ŝtato, eldonanta pasportojn kaj posedanta diplomatan korpon kaj armeon, ne estas la princlandoj Monako, Liĥtenŝtejno aŭ respubliko San Marino, sed malgranda domo je strato "Via Kondotti" en Romo. Ĝi estas la teritorio de la suverena eklezikavalira Malta Ordeno. Fondita en 1118 dum krucmilitoj la ordeno havis vastajn posedaĵojn en Orienta kaj Okcidenta Eŭropo kaj posedis la insulojn Rodos, Cipro kaj Malto.

Giganta dinosaŭro

Ĉe esplorosadoj en la usona ŝtato Kolorado oni trovis grandegan oston — skapolon de antaŭhistoria besto. Laŭ opinio de sciencistoj tiu osto apartenas al la plej kolosa besto sur la tero. Ĝi pezis ĉirkaŭ 80 tunojn kaj ĝia korpologo verŝajne atingis 26 m. Tiu giganta dinosaŭro estis nomita ultrasaŭro.

Krokodilaj farmbienoj

Antaŭ longe oni pritaksis la krokodilan ledon kiel bonegan materialon por produktado de ŝuoj, mansaketoj, zonoj ktp. Ĝia kreskanta serĉado kaŭzis registrigon de la krokodilo en la liston de bestspecoj minacataj de tuta plena neniigo. Samtempe oni praktikas vaste bredadon de krokodiloj en bienoj. Ĉi-rilate aparte interesas la spertoj de ŝtato Papua Novgvineo. Tie oni stimulas la konstruadon de privataj krokodilbredaj bienoj. La indiĝenoj konas bone la vivmanieron de la krokodiloj kaj la krokodila viando antaŭ longe eniris menuon de la papuanoj. La eksporto de krokodila haŭtego en 1978 alportis al Papua-Novgvineo enspezon de 1,6 milionoj da usonaj dolaroj.

Evgeni Georgiev

Per balono super Andoj

La Andoj trapasas tutan Sudamerikon, kaj oni konsideras ilin kiel unu el la plej altaj kaj malfacile alireblaj montsistemoj sur nia planedo. Nome pro tio ŝajnas rimarkinda la sukceso de du kuraĝuloj "transalti" la Andojn per balono, plenigita per varma aero. Post kiam ili ekflugis el la Pacifika bordo, la vojaĝantoj veturis 280 km super montopintoj kaj bonorde alteriĝis apud la argentina urbo Mendoza, La balono atingis plejalton de 5486 m super la marnivelo.

Atentu — miraĝoj!

Oficiale ne estas akceptita internacia vojsigno pri miraĝoj, sed ĉe la ŝoseo Antananarivo — Timatave en Madagaskaro similaj signoj abundas. Je tridek kilometroj for de la havenurbo Timatave estas danĝera vojkurbo. Tie la subiranta suno pentras fantastajn bildojn: la imagon konsternas lumantaj figuroj, "aeraj" kasteloj, homoj, siluetoj. Pri tio rakontas ĉiu veturinto tra tiu ĉi aŭtovojo. Bedaŭrinde tiuj ĉi mirindaj bildoj mortigis multajn ŝoforojn de aŭtomobiloj.

ALVOKO AL ESPERANTISTAJ TRADUKISTOJ

Multaj esperantistoj agas en la kadro de la internaciaj fakaj organizaĵoj. Ankaŭ esperantistaj tradukistoj devus grupiĝi por kunordigi la individuajn laborojn, organizi internaciajn kongresojn kaj seminariojn (en kunlaboro kun UEA kaj FIT — Internacia Federacio de Tradukistoj), publikigi artikolojn kaj verkojn pri la tradukarto.

Ĉiujn rimarkojn, proponojn, opiniojn kaj projektojn de regularo bonvolu sendi al jena adreso: S-ro Zbigniew Czupakło PL 24-220 Niedzwica Duza, Pollando

EVAKUADO

Oldrich Knichal

Tondra tamburo murmuris kiel mesaĝo de l' ŝtormo.

Artilerio.

Simile al kortbirdoj fuĝantaj antaŭ akcipitro ni rifuĝis al kelo dum sirenaj veoj. Aviadiloj rompis la noktan silenton. Ankoraŭ dormante ni descendis sur la ŝtuparo. Kaj en dumvoja tumulto mi aŭdis unuan fojon tiun strangan vorton. Estis en ĝi larmoj de la patrino, valizo plena de tolaĵo kaj granda demando: kio okazos morgaŭ. La evakuado.

„Eble nenio restos tie ĉi, kiam ni revenos. Eble ni revenos kiel mizeruloj”, ĝemis panjo kaj helpopete levis la okulojn ien al la plafono.

Mizera mondo. Valizo plena de subvestoj.

Ni marŝas al submontara vilaĝo, kie la grundo fruktodonas krom ŝtonoj nur iom da terpomoj kaj malgrasan herbon. La unuan por la homoj, la alian por iliaj bestoj. Lignaj loĝdomoj kun malgrandaj fenestroj. Al traba plafono fulgas kandelo sur kverka trunko — surogato de tablo. Tio estas nia rifuĝejo.

Kampano kun klinita kapo obstine silentas antaŭ la neatenditaj gastoj; ili havas nur monon, sed ĝi nenion valoras en tiu tempo. Malpli ol skatolo da alumetoj. Kaj ili petas kokidon, almenaŭ por la infanoj.

Li estas embarasita.

— Kaj kie mi havigu manĝon por miaj idoj?

— Petu kiom ajn.

— Mi ne bezonas vian monon.

— Ĉu sufiĉas ducent. . . tricent?

— Mi jam diris. Bedaŭrinde.

— Hontinde! — jelpis virino el angulo kaj propetis malbenon por ĉiuj vilaĝaj generacioj. Nia najbarino, de la tria etaĝo.

Ekstere muĝis bovinoj pro malsato, aŭ eble nur vento tiel forte muzikis inter la traboj. Ĝi flirtigis kandelan flamon kaj sur la plafono trakis ombraj fantomoj.

— Sinjorino, ni ne povas. Ankaŭ ni nenion havas — fingromontris la kampulo al sia brusto.

— Tio ja ne estas kristana ago! Panon ni ne havas kaj des malpli viandon. Kiel tion povas rigardi la bona dio?

La mastro senkonsole svingis la manon kaj mallaŭte plandis al pordo.

La nokto eksturmis. La kandela meĉo jam dronis en vaksa flako kaj nenie, nenie almenaŭ lumradio de ekstere. Ĉion glutis la tenebro.

Apenaŭ mateniĝis kaj la vilaĝanoj pelis la bovinojn al la arbaro. La sonorilego sur la preĝejo turo alarmas. Oni veturigas kusenojn, en

ili ploras beboj perturbitaj pro la subita vekigo. Kaj ie supre rondfluge patrolas aviadiloj.

En ties malbonaŭgura bruo miksitaj kun blekado de la bovinoj, kaŭrante inter betuloj sur la mola arbara musko, mi aŭdis subite la patrinan voĉon:

— Prenu, ni havas nenion alian — kaj ŝi etendis la manon kun seka pankrusto.

Ĝi estis nekutime bongusta, ĝi havis aromon de ĉiuj imageblaj tritikaj kampoj antaŭ rikolto. Ĝi estis ĉiutaga pano ŝvite perlaborita.

Mi imagis la pasintsomeran ekskurson al la apudurba monto. Panjo provizis nin per kokidaĵo kaj kuko. La suno disipis en tiu somermeza tago. Brakumo de softa herbo lulis apud ombrodonaj piceoj.

En la duonfermitaj pupiloj eksaltis virina figuro. Ĝi kuris de la dekliva subo, signis alarme per la manoj, kriante:

— Saviĝu, kuru, oni baldaŭ eksplodigos la ponton tie ĉi! Partizanoj! Descendu al la alia...!

Ni descendis kaj kuris laŭlonge de la kruta deklivo, rampis kaj stumblis sur malglataĵoj. De la transa riverflanko obtuze adis pafoj, preterniaj oreloj siblegis kugloj, falante ie proksime en la herbon. Niaj kapoj serĉis molan muskon, sed tie ĉi kreskis nur akrepikaj kardoj.

Trapaso sur la fera ponto estis neĝenita. La urbo silentis sub la varmopeza ĉielo, ĉe la stratanguloj minace elstaris la paftuboj de mitraloj.

Kiam ni rehejmiĝis, en la ĝardeno jam sidis krepusko. Sur la balkono, premite unu al la alia, staris junaj gesinjoroj.

— Jen bonŝanculoj, ja sen infanoj estas pli facile en tiu mizera tempo — ĝemis la patrino kaj helpopete rigardis al la steloriĉa ĉielo. . .

De la pankrusto restis nenio.

— Bonŝance, la aviadiloj ŝajne forflugis — la voĉo el arbusto estis kuraĝiga. Kelkaj kaŝitoj rampis el la rifuĝejo. oreleĉasis en la suspektinda silento.

— Rigardu — atentigis la najbarino, kiu vespere vane petegis kokidon. Apud la vilaĝa placo vagadis magra nudpieda ĉifonuleto, de sur la brako li deprenis ian fuŝfaritan lignan fusilon kaj imitis pafadon kontraŭ la alvenantoj:

— Paf, paf, — li hurlis tiomfoje, kiom da homoj venis renkonte. Kvazaŭ blinduloj staris malantaŭ li lignaj barakoj kun rompitaĵoj fenestroj.

— Tiujn avarulojn, tiujn sovaĝulojn mi neniam kompatos — indignis la virino de la najbara logejo. — Ili simple ne havas koron. Ĝar

eraj kristanoj helpas unu la alian. Ankaŭ en a milito oni rajtas manĝi kaj dormi en pura lito.

La vespera mallumo nin protektis dum la revenvojo. Nia domo staris kiel antaŭe. Kaj neniam antaŭe ĝi estis videbla en tiu malfrua vespero pli bone ol nun, kiam la horizonto fajrolumis pro la interpafado.

— Knabo — diris panjo iom konsternite, — almenaŭ ank oraŭ momenton, ĉio estas malvarma...

Mi kapjesis kaj komencis serĉi mian dio scias kie forgesitan poŝtranĉilon. Senrezulte. Mi perdis ĝin dum tiu hasto ie survoje aŭ en la altkreska arbara herbo.

Super la ŝtuparo en la koridoro pendis lumfubando de la subtegmentejo, malantaŭ kies pordo ni kutimis kaŝludi. La fera pordego estis malfermita kaj tra tie alvenadis retenantaj plorsingultoj. Estis ŝi nia najbarino. Kandelilo prilumis ŝian larmolavitan vizaĝon.

— Mia tolaĵo...!

Sur la ŝnuroj pendis ŝiritaj, truitaj littukoj, ĉemizoj kaj super ili aperis truego.

— Kiel kribrilo ili aspektas, dio mia, kiel kribrilo. Kial ĝuste mi?

Tra la tegmenta aperturo enŝteliĝis la firmamenta bluo, sur kiu timide ekbrilis la unuaj steloj.

Panjo vokis al vespermanĝo...

Glecoj

timida — sinĝena, timema

jelpi — akre krii

tenebra — profunda mallumo

disipi — malŝpari


softa — milde mallaŭta

aperta — malfermita, nekovrita

descendi — malsupreniri

magra — malgrasa

hasta — tre rapida



Buĝeto

Johann
Martin
Schleyer



André Cherpillod

Volapük centjara

„Prelato Johann Martin Schleyer, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kunestado, por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado... Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne revii, sed labori; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan movadon... Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.”

Tiel parolis Zamenhof en Antverpeno, la 21-an de aŭgusto 1911, okaze de la 7a Universala Kongreso de Esperanto. J. M. Schleyer, tiel honorita de Zamenhof kaj de la tiama esperantistaro, estis tamen siatempe kontraŭulo de Esperanto. Sed en tiu jaro 1911, lia lingvo estis jam mortanta, ĝi ne estis plu rivalo. Ne estis plu necese batali kontraŭ ĝi. Nun Volapük, naskiĝinta antaŭ cent jaroj, mortis definitive. Ni ne estu maldankemaj al nia prapatro; ankaŭ ni omaĝu al Schleyer.

Naskiĝo de Volapük

Johann Martin Schleyer, naskiĝinta la 18an de julio 1831, estis katolika pastro en Litzelstetten, bavara vilaĝo apud Konstanco, ĉe la bordo de la lago. Nenio, krom lia laŭdira scipovo de kvardek lingvoj, ŝajnis destini lin al la eniro en la internacilingvan historion. Sed komence

de 1878 — li estis ĵam 47-jara — venis al li la ideo krei internacian alfabeton por transskribi la sonojn de ĉiuj lingvoj. “Por kristana Eŭropo, li diris, alfabeto estas same bezonata, kiel religio”. Tiu kreaĵo renkontis ioman atenton. Tiam Schleyer, kies karaktero estis mistika, eĉ vizia, kredis sin vokita al kreado de universala lingvo, pri kiu li ricevis revelacion” en la printempa nokto de la 31a de marto 1879, dato kelkfoje konsiderata kiel naskiĝdato de Volapuko. En sekvanta majoj, li publikigis skizon de gramatiko en “Sionsharfe” (Ciona Harpo), katolika poezia gazeto, kies redaktoro li estis. Kaj en 1880, nur unu jaron post la “revelacio”, aperis la unua lernolibro de la nova lingvo, “Volapük die Weltsprache” (Volapuko la Mondlingvo). Ĝi surhavis la fieran devizon „Menade bal püki bal” (Al unu homaro unu lingvon). La postan jaron Schleyer fondis la unuan internacian gazeton „Volapükabled” (Volapukfolio). Kaj en 1882 naskiĝis en Alberweiler, Vurtembergo, la unua societo de volapukistoj.

En sia parolado de 1911 Zamenhof pravis: Schleyer estas ja la patro de la tuta internacilingva movado. En jaro 1882, dum Zamenhof ankoraŭ surhavis la studentan uniformon, dum Esperanto estis ankoraŭ en la primitiva formo de Praesperanto, jam ekzistis — dank’ al Schleyer — la unua embrio de la internacilingva movado. Tion ni ne forgesu.

Disvolviĝo

En septembro 1882 malfermiĝis en Vurtembergo la unua konferenco de adeptoj de la tutmonda lingvo. Ĝirkaŭ 70 kunvenintoj solene akklamis la aperon de Schleyer. Ekde tiam la movado iris sur pli kaj pli granda vojo. En aŭgusto 1884 de la 25a ĝis la 28a okazis la Unua Universala Kongreso de Volapuko en Friedrichshafen, ĉe la Konstanca Lago. Bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj estis germanoj, kaj la kongresa lingvo estis la germana. En 1887 en Munkeno de la 6a ĝis la 9a de aŭgusto okazis la Dua kongreso; kiel en la unua, oni parolis germane, kvankam ĉi-foje la ĉeestantoj venis de pluraj landoj. Okaze de ĉi tiu kongreso, estis kreita Internacia Akademio de Volapuko (Kadem Bevünetik Volapüka), en kiu Schleyer estis elektita dumviva prezidanto. Sed fakte, la vera estro de la Akademio estis ĝia direktoro August Kerckhoffs, profesoro en la pariza Supera Komerclernejjo. Kerckhoffs, volapukisto ekde 1884, estis fondinto de kurso, de gazeto kaj de propaganda societo en Francio. Ekde tiam instaliĝis konflikto en la movado; Schleyer, konservema kaj diktatora, konsideris la lingvon kiel sian proprajon; male, Kerckhoffs estis reformema, kaj konsideris la lingvon kiel proprajon de ĉiuj ĝiaj parolantoj. Tial, post tiu dua kongreso, komenciĝis internaj malkonsentoj kaj miskomprenoj ĉe la volapukistoj. Kerckhoffs rifuzis agnoski por Schleyer la rajton malakcepti

la novaĵojn kaj reformojn akceptitajn de la Akademio. Kelkaj reformemaj volapukistoj forlasis la movadon, kelkaj ankaŭ aliĝis al la tute nova lingvo de ia D-ro Esperanto: inter ili, la tuta Volapuka Societo de Nurnbergo, fondita en 1885 de la ĵurnalisto Leopold Einstein, transiris al Esperanto, kune kun sia estro en decembro 1888.

Apogeo kaj ekpereo

De la 19a ĝis la 21a de aŭgusto 1889 en Parizo okazis la tria (kaj lasta) kongreso de Volapuko, alvokita de la Akademio, sed ne agnoskita de Schleyer. Ĉirkaŭ 200 kunvenintoj el multaj landoj, male de tio kio okazis en la unuaj du kongresoj, parolis nur volapuke. Por la unua fojo en la historio de la homaro, 16 jarojn antaŭ la Bulonja evento, internacia kongreso parolis internacian lingvon. Kaj en tiu jaro 1889, jaro de la gloro de Volapük, oni povis nombri en la mondo 283 volapukajn societojn, 25 gazetojn, lernolibrojn en 25 lingvoj, kaj pli ol 1000 diplomitajn instruistojn de la lingvo. Volapuko estis instruata en pluraj superaj lernejoj de Eŭropo (Parizo, Bordojo, Madrido, Vieno), de Nordameriko, kaj de Sudameriko. En 1894 Schleyer estis rekompencita de la papo Leono XIII per la titolo de Persona Gambelano de Lia Papa Moŝto.

Sed la jaro 1889 signas ankaŭ la komencon de la disfalo de la unua mondlingvo. La tria kongreso komisiis al la Akademio fari en la lingvo necesajn reformojn. Kiel kutime, Schleyer malagnoskis la reformemulojn. Multaj volapukistoj, malesperante pri la lingvo, forlasis la ideon mem de lingvo internacia, aŭ publikigis proprajn projektojn. El la brila movado de la jaroj 81—89, restis en 1900 nur 159 membroj agnoskitaj de Schleyer. La jaro 1908 vidis (kun la fondiĝo de UEA) la morton de la lasta volapuka gazeto. Kaj la 12an de aŭgusto 1912, unu jaron post la brila antverpena Esperanto-Kongreso, forpasis J. M. Schleyer, 81-jaraĝa. En majoj 1913, lia posteulo, pastro Sleymer, sendis cirkuleron „Volapükanes valik” (al ĉiuj volapukistoj), kiu restis sen respondoj. Ĝi estas verŝajne la lasta volapuklingva publikaĵo. Oni povas diri, ke Volapuko mortis kune kun sia aŭtoro.

Diverseco de la reformprovoj

Seniluziiginte pri la sukceso de l’afero, Kerckhoffs ekŝiĝis en 1891 el la ofico de direktoro de la Akademio. Lin anstataŭis la germandevena inĝeniero Voldemar Rosenberger, el Peterburgo, kiu komencis gvidi ellaboron de tute nova sistemo, kiu aperis en 1902 sub la nomo Idiom Neutral. Tiu lingvo havas malmulton komunan kun Volapuko; oni nur komparu “Kadem Bevünetik” kaj “Akademi Internasional”, samsignifajn. Sed ankaŭ tiu ĉi lingvo devis suferi refor-

mojn; en 1907, la jaro de Ido, aperis Projekt Reformed. Kaj ĉi tio cedis lokon en 1912 al Reform Neutral, kies patroj estis, krom Rosenberger, pastro J. Pinh el Luksemburgo, kaj la estona oficiro Edgar von Wahl. Pinh okupiĝis ankaŭ pri Interlingua, alia nomo de la Latino sine Flexione de G. Peano, en kiu li faris aldonojn kaj korektojn. Kaj von Wahl, kiu estis komence volapukisto, poste unu el la tute unuaj esperantistoj, kaj eĉ tradukis esperanten Princinon Mary de Lermontov, devis esti ankaŭ idisto, kaj krei en 1922 alian planlingvon, Occidental'on. Li montras bonan ekzemplon de tiu malsano, kiun William Gilbert nomas: "Interlingvistika malstabileco".

Renaskiĝo... kaj remorto

En 1930, iu nederlanda kuracisto, D-ro Arie De Jong, volapukisto ekde 1924, kaj granda admiranto de tiu lingvo, klopodis restarigi volapukan movadon kaj eldoni lernolibrojn kaj vortarojn en nederlanda kaj germana lingvoj. Li verkis ankaŭ bonan volapuklingvan gramatikon kaj lanĉis gazeton "Volapükagased" (Volapukgazeto). "Volapük, li skribis, neniam estis superita, eĉ egalita, de iu ajn internacia lingvo, ĝuste pro tio ke ĝi prezentas ĉiujn bezonatajn ecojn de ekzakteco kaj neŭtraleco". Tamen De Jong konsciis pri kelkaj malvirtoj en la iama lingvo de Schleyer (foresto de litero R, artefariteco de kelkaj radikoj, malprecizeco de kelkaj afiksoj, kaj rilate al la unua volapuko, tiu de De Jong estas iom malsama: en tiu "Volapük nulik" (Nova Volapuko), la reformoj estas ne tre grandaj, sed gravaj. Malgraŭ tiu plibonigo, la renovigita lingvo ne sukcesis naski veran movadon. La "Volapükagased" estis tamen eldonata ĝis la 60aj jaroj, sub la redaktado de la volapukakademiano (kaj cetere UEA-fakdelegito) F. J. Krüger kaj ankaŭ de la germano Johann Schmidt, kiu mortis en 1977.

De Jong mortis, 90-jaraĝa la 12an de oktobro 1957. "Volapükagased" de longe ne aperis plu. La sola restaĵo de Volapuko, la unua internacia vera lingvo, estas stoko da libroj de D-ro De Jong en Leiden, Nederlando, en la librejo E. J. Brill...

Kaŭzoj de malkresko

Kial pereis Volapuko? Oni ĝenerale kredas, ke ĝin venkis Esperanto. Tio ne estas ĝusta, ĉar kiam Volapuko komencis malkreski, en 1889, la juna Esperanto estis ankoraŭ tro malforta por venki ion ajn. La kaŭzojn de sia pereco Volapük havis en si mem.

Oni ofte primokis la "sovaĝajn sonojn" de tiu lingvo. Estas vere, ke ĝia fonetiko tro similis al la germana (ekzisto de la sonoj ö kaj ü, distingo inter Ä kaj E). Sed tio ne estas grava: eĉ kun tia fonetiko, Volapuko estus povinta

funkcii. Ege pli grava estas la malfacileco de la vorttrezoro: laŭ Grabowski, kiu estis volapukisto antaŭ ol fariĝi esperantisto, Schleyer mem devis ofte uzi la vortaron por paroli sian propran lingvon. Tiu malfacileco devenas de kvar ĉefaj kaŭzoj:

1) Schleyer kredis, ke des pli facile memorebla estas vorto, ju pli mallonga ĝi estas. Por konvinkiĝi pri la malĝusteco de tiu aserto, sufiĉas rimarki kiel malfacile memoreblaj estas la unusilabaj ĉinaj vortoj: ĉang, ĉeng, ĉong, ĉung, ĝang, ĝeng, ŝang, ŝeng, ktp. Ekde tiu opinio, Schleyer mallongigis la radikojn ĝis nerekonbleco: *nat* (naturo), *net* (nacio), *fed* (federacio), *gad* (ĝardeno), *rel* (religio), *sen* (senato), *vat* (akvo). Konata estas la serio de vortoj, citita de Zamenhof: *bap*, *pab*, *pap*, *päp*, *pep*, *pöp*, *peb*, *pöb*, *böb*, *bob*, *pop*, *pup*, *bub*, *pub*, *püb*, *bib*, *pip*, *püp*, ktp. Ili estas tiel similaj unu je la alia, ke eĉ volapukistoj orientiĝis malfacile en tiu labirinto.

2) En Volapuko ne ekzistis la konsonanto R, ĉar, diris Schleyer, "la ĉinoj, la infanoj kaj la maljunuloj elparolas ĝin malfacile". Oni povas rebati, ke por la japanoj la R estas facila, sed malfacila estas la L; kaj ke la volapukaj Ö kaj Ü estas malfacile prononceblaj por la plejparto de la homaro. Do R de la naturaj radikoj estis ŝanĝita al L: *flap* (frapo), *flol* (gloro), *mel* (maro), *yel* (jaro), *flen* (amiko, el la angla *friend*), *blod* (frato, el la angla *brother*). De Jong en 1930 redonis ofte R: *flor* (floro).

3) Multaj radikoj estas pli malpli arbitraj: *lad* (koro), *nuf* (tegmento), *nenfümbidir* (infinitivo). Aŭ ĝiaj etimoj estas preskaŭ nerekonceblaj: *xab* (akso), *nol* (scio, el la angla *knowledge*). Iuj radikoj estas tute ne internaciaj: *sumbut* (meĉo) venas de la malaja *sumbu*, kaj estas de unua vido komprenebla nur de indonezianoj, dum "meĉo" estas komprenebla de francoj, italoj, hispanoj, portugaloj, rumanoj, latinamerikanoj.

4) Ĉefa erarego: la radikoj devige komenciĝas kaj finiĝas per konsonanto, ĉar vokalo ĉe la komenco aŭ fino de vorto estas gramatika signo. Tial, eĉ la plej internaciaj vortoj estas kripligitaj: *lafab* (alfabeto), *ladet* (adreso), *leül* (oleo) *sean* (aceano), *nisul* (insulo) *prilul* (aprilo). Same „Ameriiko“ fariĝas *Melop*: „a“ forigita, „ik“ forigita, ĉar ĝi estas nur adjektiva finaĵo, „mer“ ŝanĝita al *mel*, kaj *op* aldonita pro analogio kun *Yürop* (Eŭropo), *Flikor*, (Afriko), *Siyop* (Azio), *Litalyän* (Italio), *Lägüptän* (Egiptio). En nova Volapuko, *Melop* kaj *Flikop* fariĝas *Merop* kaj *Frikop*. Plie, la lasta konsonanto de radiko ne povas esti S, C, J, X, Z, ĉar tiuj sonoj ne povas kunekzisti kun la S de la pluralo: *klad* (klaso), *plad* (loko), *nud* (nazo).

(Daŭrigota)



FRG

La gazetara laboro de MEM-sekcio

Informado estas grava tasko. Ne sufiĉas informi MEM-anojn pri la agado de la propra organizo, sed necesas informi la ekster-movadan publikon. La problemo ne nur en FRG estas, kiel igi la amasinformilojn raporti pri Esperanto-aferoj.

Ni ne havis financajn rimedojn por informi la pli ol dudek radio-kaj televido staciojn, la dekojn da tutlandaj gazetoj, la milojn da regionaj kaj lokaj gazetoj.

Sed ni ne bezonas informi ĉiujn. MEM sin konsideras kiel parton de la internacia Pac-Movado.

Ekzistas certa aro da gazetoj kaj revuoj en la t. n. „demokrata spektro”, kiu koincidas kun la spektro de MEM. Nia tasko ja estas kaj varbi esperantistojn por la pacmovado, kaj montri al la pacluktantoj la avantaĝojn de Esperanto. Per la „demokrataj” amasinformiloj ni atingas 500 000 personojn el la 60 milionoj en FRG.

El ili ni elektis tiujn gazetojn kaj revuojn, kiuj estas la plej konataj kaj kontroleblaj, ĉar MEM-anoj regule legas ilin.

Nia tasko estis prezenti la Esperanto-Movadon kiel parton de la demokrata movado, estante ne ludilo por sektuloj, sed ilo de pacbatalantoj, praktikilo de internaciismo. La problemo estas trovi en la Esperanto-movado taŭgajn novaĵojn. Jen kelkaj ekzemploj:

— Fine de 1978 aperis la konata glumarko „Atomenergio — ne, dankon”, en Esperanto. Tiun fakton ni ligis kun prelego pri atomenergio, kiun faris MEM-ano dum seminario de Germana Esperanto Junularo. La informilo por la gazetaro vekis nun la impreson, ke la esperantistoj ĉiuj estas aktivaj kontraŭuloj de atomenergio. Ĝi aperis en gazetoj.

— La Esperanto-grupo en Samarkand (Uzbekio) petis materialon por porpaca ekspozicio. Post malgrandaj ŝanĝoj la informo estis taŭga kaj aperis en la du plej grandaj ĉiutagaj gazetoj.

— Tre bone uzebla estas la laboro de la Esperanto-fako de la naturamikoj, ĉar ili kutime estas konsiderataj en la demokrata spektro.

Krom tiuj informoj al la gazetaro, ni sukcesis aperigi kelkajn leterojn de legantoj, kiuj reagis al aliaj artikoloj.

Ni celas establi Esperanton kiel memkompreneblan parton de la „demokrata spektro”, kies parto ĝi objekte estas. Homoj, kiuj sufiĉe ofte legas la vorton „Esperanto” ligita al aliaj

vortoj, kiuj havas pozitivan signifon por ili, transdonas pozitivan senton ankaŭ al Esperanto. Tio bezonas tempon, ĉar la leganto devas plurfoje vidi la vorton.

Roland Schnell, Karlsruhe, FRG

BULGARIO

Kunveno pri MEM en Kjustendil

Je la 10-a kaj 11-a de novembro 1979 en Kjustendil okazis okcidentbulgara E-renkontiĝo dediĉita al la batalo por paco kaj malarmado, kiun partoprenis reprezentantoj de pluraj distriktoj. La renkontiĝo estis organizita de Bulgara Komitato de MEM, Distrikta Estraro de BEA en Kjustendil, DK de Patrolanda Fronto kaj DK pri Pacdefendo.

La unuan tagon vespere okazis granda kunveno (ĉ. 200 ĉeestantoj). La elstara bulgara esperantisto kaj pacbatalanto Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM kaj membro de la Mondpaca Konsilio en vasta parolado analizis la internacian situacion kaj skizis la batalon por paco, emfazante la aktivecon de MEM.

Salutis la kunvenon la prezidanto Kiril Nikolov kaj en la nomo de la Komsomolo ElkaTaneva, sekretariino de ties DK kaj membro de DK de Paco.

La kunveno akceptis telegramon al MPK, en kiu ĝi kondamnis la klopodojn de la imperiistoj haltigi la evoluon de la malstreĉiĝo kaj deklaris sian pretecon defendi la pacon.

La sekvan matenon la partoprenantoj vizitis la domon-muzeon de esperantisto-martiro Dimitr Kaljaŝki, mortigita de la faŝistoj.

Posttagmeze okazis konferenco de membroj de MEM. Nikola Aleksiev kaj Dimitr Haĝiev — prezidanto de MEM en Bulgario parolis pri la agadplano de MEM kaj la konkretaj taskoj de la bulgaraj MEM-anoj.

Tio estis la tria regiona aranĝo dum la jaro.

Svetezar Matev



Bruselo akceptas gastojn

Leo Tolstoj. La homo, la verkisto kaj la reformisto.

Rememoroj originale verkitaj en Esperanto de Victor Lebrun, amiko kaj sekretario. 1978. Eld. Gabrielli. Romo, Italio.

En n-ro 6/1978 de "Paco", okaze de la 100-a jubileo de la mondfama rusa verkisto aperis nelonga noto sub la titolo "Koloso de la mondliteraturo". Tial mi ne skribos en tiu ĉi recenzo pri la signifo de L. Tolstoj kiel genia verkisto, realisma kritikisto de la tempo, en kiu eksplodis la unua revolucio de la rusa popolo kontraŭ la carismo.

Tolstoj havas du bazajn periodojn en sia vivo kaj kreado. La unua kaj la plej grava estas la periodo de genia beletra verkado. En ĝi aperas verkoj belegaj: la trilogio "Infaneco", "Adoleskanteco" kaj "Juneco", ĉefverkoj kiel romanoj "Milito kaj paco", "Anna Karenina", "Reviviĝo", rakontoj "Patro Sergeo", "Sonato de Kreutzer", "Post la balo", dramverkoj "Vivanta mortinto", "Potenco de la obskuro" k.a.

La dua periodo komenciĝas post kiam Tolstoj ĉesis verki beletraĵojn. En ĝi en vico da artikoloj kaj rakontoj, li esprimas sian religi-filozofian koncepton pri ne-rezisto kontraŭ perforto, pri ne-mortigo de homoj kaj animaloj, pri kristaneco sen misteroj, pri vegetarismo.

Victor Lebrun aliĝis al la religia kaj etika instruo de Tolstoj, korespondis kun li, kaj en la jaro 1900 veturis al Jasnaja Poljana, al Lev Tolstoj mem, kie li kunlaboris kun la mondfama verkisto, kaj dum kelka tempo funkciis kiel lia sekretario.

En la libro "Leo Tolstoj" la aŭtoro bonege redonas la renkontiĝojn kaj interparolojn kun la verkisto, la scenon pri la interkonatiĝo kun lia edzino. Apartan intereson prezentas la dudeko da leteroj, kiujn Tolstoj sendis al Lebrun, al lia patrino, al lia amiko d-ro Makovickij.

Tiu ĉi parto de la traktata libro estas vere interesa por la legantaro, ĉar ĝi donas la eblecon konatiĝi senpere kun la genia verkisto, kun la medio, en kiu li vivis en tiu periodo.

Nun mi volas atentigi ankaŭ pri kelkaj — tute ne ĉiuj — mankoj de la libro.

Granda parto de la 400-paĝa volumo prezentas priskribon ne tiom de la vivo, labormaniero, rilatoj de Tolstoj al familianoj kaj amikoj, de lia pensado kiel pedagogo kaj moralisto, kiel homo kaj kuraĝa kontraŭulo de carismo kaj ortodoksismo. En plej granda parto de la libro V. Lebrun prezentas siajn proprajn rezonadojn,

analizojn, starpunktojn, eĉ prijuĝojn, korektojn, kompletigojn kaj proponojn lige kun la traktata materio. Kelkfoje li devojiĝas de la temo kaj plenigas la paĝojn per flankaĵoj. Kion komunan kun la temo povus havi, ekzemple, la listo de verkoj de franca verkisto Guy de Maupassant? Pri la rilato de V. Lebrun al la vere admirinda literatura heredaĵo de Tolstoj parolas interalie tio, ke en la ĉapitro sub titolo "Modeloj artaj kaj historiaj eternvaloraj" li trovas, ke ne estas tute necese tralegi verkojn kiel "Anna Karenina" — verko, kiu spegulas la tragedion de la rusa virino el la kortegana medio, venanta en konflikton kun la hipokrita moralo de la mondumo kaj montranta la socialajn kontraŭdirojn en la periodo de akra rompo de la servutaj rilatoj kaj evoluo de la kapitalismo en cara Ruslando (paĝoj 387—392 de la libro).

Kaj nun kelkaj kritikaj notoj pri la lingvaĵo de la verko. Multloke la teksto de la libro estas ne-konforma al la Zamenhofa Esperanto kaj al la atingoj de nia nuntempa literaturo.

Tro ofta, nekutima uzo de la sufikso -ad. Oni trankvile povas redukti 90-procente la nombron de la ad-vortoj; per tio la libro nur gajnus. Malĝusta, erara uzo de sufikso -ig ĉe verboj transitivaj: finformigi (anst. finformi); mi elnaŭziĝis la Mondon (anst. min naŭzis la mondumo); mi adresigas (adresas) al vi la manuskripton; konvinkigi (konvinki) kaj multe da aliaj. Aliflanke, erara ellaso de tiu ĉi sufikso: mi pasas (pasigas) la tempon; mi tuj daŭris (daŭrigis) mian vojon. Erara uzo de sufikso ig ĉe ne-transitivaj verboj: mi iom enuiĝas (enuas!) sen ili. Kaj kontraŭe — ne-uzo de tiu ĉi sufikso en okazoj, kiam ĝi estas necesa: tiel komencas (komenciĝas) la sistema instruado. Tro ofta uzo de sufikso -eg: agemega (agema), suferegadis (suferis). Tia ofta ripetado senfortigas ĝin, ne ebligas ĝin uzi tiam, kiam ĝi estas vere necesa.

Formado de vortoj pezaj, ne-elvokivaj, kelkfoje eraraj, kun pluraj afiksoj: dankegema (danka, ege danko, tre danko); turmentegejoj (turmentejoj, torturejoj); bluiĝetas (bluetas). Vortoj ne-ekzistantaj en Esperanto aŭ neĝuste uzitaj: ortodoksio (ortodoksismo), parenta (parenca), direkta rekta). Precipe ofte oni kunpuŝiĝas kun la vorto kelke en senco de iom, kelkio, kelkakvante: enspezas mi kelke malpli ol rusa kamparano k. m. s. . .

Eraroj gramatikaj kaj sintaksaj: nu, tio estas samtempe bone kaj malbone (bona kaj malbona); mi ne ĉiam sentas min sufiĉe spertan (sperta!) por gvidadi (gvidi).

La aŭtoro esperantigas nomojn! Sisteme ni renkontas tradukitan patronomon: Vasilio Vasiliido (V. Vasiljeviĉ). Tolstoj fariĝas Leo Nikolaido (Leo aŭ Lev Nikolajevič); Maria Aleksandridino (Maria Aleksandrova). Se oni volas esti principa kaj sistema, oni devas same absurde rebapti la nomojn Tomson al Tomfilo (aŭ ido). Bunesku al Bunfilo, Simeonov al Siemonofilo! Tie kaj tie preseraroj.

Konklude oni povas diri, ke la libro "Leo Tolstoj" estas valora kaj necesa, precipe en tiu parto, kie la aŭtoro skribas ne pri si, sed pri Tolstoj: pri lia personeco, pri lia viv- kaj labormaniero, pri liaj rilatoj al homoj, pri la kritika rilato al la obskurantismo de la tiama cara (kun restaĵoj de feŭdismo) reĝimo en Rusio.

Oni ne devas subtaksi la neceson pri senerara, altnivela lingvaĵo de Esperanto-libroj. La libro "Leo Tolstoj" estas bedaŭrinda ekzemplo de eldono de verko ne antaŭe reviziita lingve de redaktoro. Kiom ajn lingve spertestus la aŭtoro, du okuloj ne povas rimarki ĉion tiel bone kiel kvar okuloj.

Mi deziras sukceson al la libro "Leo Tolstoj" kaj atendas ĝian duan eldonon purigita de superfluaĵoj kaj kun zorgo reviziita lingvaĵo.

As. Grigorov

Walter Kobelt kaj aliaj Lingvogvidilo esperanto-hindia

Zürich 1979, 8-paĝa faldfolio, prezo: 2 internaciaj respondkuponoj

Temas pri verketo, kiu celas prezenti specimenojn de la hindia lingvo al esperantistoj. Estas uzebla ankaŭ por prezenti specimenojn de la internacia lingvo al hindoj.

Ĝi enhavas proksimume cent esprimojn utiligeblajn de turistoj por peti hindojn pri hotelaj ĉambroj, monŝanĝejo kaj similaj bezonaĵoj. Mi ne dirus ke ĝi estas sufica por ke oni traveturu la landon, sed ankaŭ multe pli grandaj tiuspecaj gvidiloj ne estas suficaj. Interesa kaj relative ampleksa estas la klarigo pri la hindia devanagara skribo.

Tamen, sendepende de ĝia praktika kaj propaganda valoro, tiu ĉi verketo estas salutinda kiel bona ekzemplo de kunlaboro inter eŭropaj kaj triamondaj esperantistoj.

Interesatoj mendu ĝin ĉe la aŭtoro (W. Kobelt, Landquartstr. 81b, CH-9320 Arboren, Svisujo).

Renato Corsetti

Kompleta verkaro de Bruno Migliorini en kaj pri Esperanto

Kelkaj italaj esperantistoj laboras por eldoni la kompletan verkaron de Bruno Migliorini en kaj pri Esperanto.

Surbaze de la ĵus aperinta bibliografio de la verkoj de Migliorini oni jam kolektis multajn tekstojn kaj nun oni trastudas ilin por aranĝi ilin eldonpretaj.

Ĉar oni havas la impreson, ke en la aperinta kompleta bibliografio tamen mankas indikoj pri artikoloj publikigitaj en ne-italaj Esperanto-revuoj, oni alvokas ĉiujn esperantistojn, kiuj konas verkojn de Bruno Migliorini en ne-italaj Esperanto-revuoj, sendi informon pri ili al la kunordiganto de la itala laborgrupo: **Silvio Stopponi, Via Guerrazzi, 18 I-51100 Pistoia, Italujo**

LA VERO PRI LA GRANDA PATROLANDA MILITO DE USSR

(Pri la dokumentara filmserio "La granda patrolanda milito")

La sovetaj kaj la alilandaj kinofakuloj nomas la dudekpartan filmserion pri la Granda Patrolanda Milito de Sovetunio "senprecedenta, konsternanta, sensacia" kinoepopeo.

...22-a de junio estas la plej longa tago en la jaro, sonas la voĉo de la parolisto. Ĝi fariĝos ankaŭ plej amara tago por la lando, etendiĝanta de la Karpatoj ĝis la Pacifiko.

Lastaj momentoj de kvieto. Kamufiante sin en la nebulo, antaŭ mateniĝo la faŝistaj armeoj eliras al deirpozicioj. En la filmokadro staras soveta landlima fosto.

Apud la limoj kun Sovetunio la hitleranoj koncentras pli ol kvin milionojn da soldatoj, pli ol kvin mil aviadilojn, pli ol 47 mil kanonojn kaj obusĵetilojn. Ili esperas pri rapida venko.

La filmkadroj revenigas la spektanton al la tagoj de la germana faŝismo, al la paradoj de Hitler. Placo, ŝtopita de publiko. La tumulto antaŭenĵetas sin al la "gvidanto", kiu staras sur la tribuno. Multaj homoj viŝas larmojn pro kortuŝo. En kion poste tiu kortuŝo transformiĝis?

... Lastaj momentoj antaŭ la invado. La faŝistaj soldatoj kuras al la kanonoj. Ekmoviĝas la tankoj, forflugas la aviadiloj. Al la soveta lando estis farita bato — perfida kaj terura. Jam dum la unua tago pereas miloj da pacaj loĝantoj, infanoj, virinoj, maljunuloj.

Tiel komenciĝas la kinoepopeo.

En la komenco mem de la batalo apud Moskvo la nazia propagando per la buŝo de Goebbels trumpetas: "... Ankoraŭ kvar-kvin tagojn kaj la flago kun la svastiko ekflirtos super Kremlo!"

Alternas filmscenoj de kruda soldata Moskvo dum la terura jaro 1941 kaj filmscenoj el la germana kinokroniko; sub la sonoj de solena muziko marŝas la invadintoj. Tiam al ili ŝajnas, ke la milito preskaŭ alproksimiĝas al sia fino. Ja ili jam okupis Vienon, Pragon, Varsovion, Kopenhagon, Amsterdamon, Parizon, Belgradon. Sed ili sin trompas.

... Novaj filmscenoj. La spektanto vidas Hitler apud la mapo en la stabo de la grupo de armeoj "La Centro". Ĝuste tie eksonas liaj krue-laj paroloj: "Moskvo devas esti tiele ĉirkaŭita, por ke eĉ ne unu ĝia enloĝanto — viro, virino aŭ infano — povu forlasi ĝin."

La ekrano redonas la historian paradon sur la Ruĝa Placo je la 7-a de novembro 1941. De tie la trupoj ekiras rekte al la antaŭa batallinio por renkonti la malamikon kaj haltigi lian ofensivon.

... La venka fino de la apudmoskva batalo. Fuĝado de la faŝistaj trupoj el la soveta ĉefurbo. Kolonoj de kaptitaj hitleranoj. La venkobatita tekniko de la malamiko, kiun, por ĝin vidi, venis el Londono la ministro pri eksterlandaj aferoj de Grandbritujo Antony Eden.

En la granda batalo apud Moskvo estis enteregita la hitlera plano pri fulme rapida milito, por ĉiam estis senlorigita la mito pri la "nevenkebleco" de la faŝista armeo. Kaj post unu jaro la frakaso de la potenca germana grupo da armeoj apud Stalingrado estis la komenco de la abrupta turnopunkto en la irado de la Granda Patrolanda Milito kiel tutaĵo. Tiu ĉi abrupta ŝanĝo finiĝis per la ruiniga malvenko de la hitleranaj trupoj ĉe la arko de Kursk.

En la procezo de la potencaj militoperacioj en 1944 la tuta soveta lando estis forpurigita de la faŝista kanajlaro. Dum la majaj tagoj de 1945 la sovetaj trupoj levis la ruĝan flagon de la venko super la faŝistan parlamenton en Berlino.

Tiu ĉi filmo, kreita en la Centra Studio de Dokumentaj Filmoj en Moskvo laŭ mendo kaj partopreno de usona filmkompanio "Air Time International", havas du titolojn. En la sovetaj teatroj ĝi estas projekciata sub titolo "La granda patrolanda milito", sed en multaj landoj ekster Sovetunio — sub la titolo „La nekonata milito“. Tiu ĉi titolo ne estas arbitre elektita, sed ĝi estas rezulto de certa proceso, kiu disvolviĝas sur la internacia areno en daŭro de la lastaj jardekoj.

La 9-an de majo 1945 finiĝis la sangoverŝa batalo, kiu kostis al la soveta popolo 20 milionojn da homoj. Dum tiuj tagoj admiris la heroaĵon de la soveta armeo la tuta mondo, inkluzivante ankaŭ plej elstarajn ŝtatojn en Okcidento.

Sed, kiel konate, en la fino de la kvardekaj kaj dum la kvindekaj jaroj super la mondo ekpendis la nuboj de la "malvarma milito". La cirkonstancoj por la apero de tiu ĉi malbonaŭgura plano de la internacia kontraŭkomunismo estas konataj. Meze de ĝiaj multnombraj pereigaj postsekvoj estis ankaŭ tio, ke iuj decidis forviŝi el la memoro de la popoloj ĉion, kio estis ligita kun la heroaĵo de la soveta popolo, al ĝia abnegacia batalo kontraŭ la agresinto, al ĝiaj oferoj je la nomo de la libero de Eŭropo kaj de la tuta mondo.

Kiel la soveta popolo militis, en Okcidento tion oni aŭ prisilentis aŭ misprezentis. Jen pro tio estas nenio miriga, ke kiam la reprezentantoj de "Air Time International" konatiĝis en la sovetaj arkivoj kun la veraj dokumentoj de la Granda Patrolanda Milito, ili efektive estis konsternitaj.

La aŭtora-reĝisoro grupo trarigardis pli ol unu milionon da metroj da historiaj kinodokumentoj el la sovetaj kaj alilandaj arkivoj. Sur la lokoj, kie okazis la bataloj, estis faritaj koloraj fotoj. Oni filmis partoprenintojn kaj heroojn

de la milito. Kiel bazo de la filmo servis la fotoj de 250 sovetaj frontaj operatoroj, kiuj dum ĉiuj 1418 tagoj kaj noktoj de la milito iris kune kun la soldatoj kaj ĉiu kvina el ili pereis en la bataloj.

„La nekonata milito” estis projekciita sur la ekranoj de Usono. Ĝi gajnis unuajn premiojn de la kinofestivaloj en Nov-Jorko kaj Miami. La filmo estis aĉetita de FRG, Aŭstrio, Aŭstralio, Svislando, Irlando, Hongkongo, Kuvajto, Irano, Ekvadoro, Malaizio, Panamo, Grekio kaj aliaj landoj.

„Rememori tiun ĉi militon, tio por ni signifas alvokon por vigla atento pri la planoj de ĉiaj novaj provoj de la agresemaj fortoj kaj, plej grave, alvokon por senlaca batalo por daŭra paco, por haltigo de la vetarmado, por paca kunkuzistado inter la ŝtatoj” — diras L.I. Breĵnev en la lasta parto de „La nekonata milito”. Tiuj ĉi vortoj estas ĉeftemo de la tuta kinoepopeo.

Tradukis: D. Haĝiev



Bulgario:

- Stefka Ruseva, 7003 Ruse, kv. Zaharen zavod, dom 13, (37-jara konstru-teknikisto).
 Stefka Maksimova, 7003 Ruse, kv. Zaharen zavod, bl. 6, (27-jara, konstru-teknikisto).
 Kunka Ivanova, 7003, Ruse, kv. Zaharen zavod, dom 46, (30-jara, oficistino).
 Katja Pavlova, 7003 Ruse, kv. Zaharen zavod, dom 16, (28-jara, oficistino).
 Erineta Pavlova, 7003 Ruse, kv. Zaharen Zavod, dom 16, (25-jara, studentino).
 Emil Pavlov, 7003 Ruse, kv. Zaharen zavod, dom 16, (27-jara, studento).
 Galja Kalčeva, 7003 Ruse, kv. Zaharen zavod, bl. 7, (27-jara oficistino).
 Krasimir Paskalev, 7005 Ruse, kv. „Rodina”, bl. „Skata”, vh. A, (20-jara, konstru-teknikisto).
 Maria Ivanova, 7004 Ruse, ul. „Alej Vāzrajdane” — 123, vh. III, (37-jara inĝeniero).
 Maria Aleksandrova, 7002 Ruse, ul. „Major Uzunov” 10, A, (39-jara, zooteknikisto).
 Antoaneta Ilieva, vilaĝo Marten-7058, distr. Ruse, (30-jara, hospitala flegistino).
 Maria Minčeva, 7000 Ruse, ul. Stanke Dimitrov 63, (37-jara).
 Emilija Andreeva, 7650 Dulovo, distr. Silistra, ul. „Hristo Botev” n-ro 90, (16-jara).
 Tatjana Kondova, 7680 vil. Okorŝ, distr. Silistra, (16-jara).
 Stojan Stojanov, 4210 Stambolijski, ul. Zavodska 5, (18-jara, lernanto) pm, bk., flagetoj de ŝtatoj.
 Irina Bahilina (27-jara historiistino), 8000 Burgas, kv. Zornica bl. 18, et. 3, ap. 3.
 Karamfila Dimitrova, 8000 Burgas, At. Mančev 64.
 Elena Stajkova, 6155 Pavel Banja, „9 Septemvri” 19, (instruistino).
 Pepa Kalajĝieva, 6155 Pavel Banja, sanatorio n-ro 1, (medicinistino).

Nina Haĝiivanova, 6155 Pavel Banja, „Georgi Dimitrov” 11, (medicinistino).

Keti Nenova, 6155 Pavel Banja, „Vasil Levski” 21, (instruistino).

Marija Angelova, 6155 Pavel Banja, sanatorio N-ro 1, (medicinistino).

Gena Mārzeva, 6155 Pavel Banja, „Vasil Levski” 27, (flegistino)

Pollando:

Instigu kaj kuraĝigu junajn gekursanojn amase skribante al Esperanto-klubo ĉe Zespól Szkól Zawodowych nr 5, ul. Tkacka 11, PL 97-200 Tomaszów Maz. Estraro de PEA-rondo

USSR

Oive Ojasilo, Estonio, 200029 Tallinn, Musta Mäe Tee 173—19 (13-jara) en Esperanto aŭ angla lingvo.

Brik Natali, 344007 Rostov — Don, Temernickaja, 68 ap. 11. (31-jara). pri socialaj problemoj kaj internacia kompreniĝo.

Komuna adreso: SU-350049 Krasnodar, ul. Gagarina 145, kv. 11:

— Kocarj Irina, (15-jara, lernantino),

— Kocarj Marina (24-jara, studentino, E-kursgvidantino),

— Kocarj Sergeo (29-jara, instruisto de E-to, prezidanto de E-organizaĵo).

F-ino Marina Parŝĉikova, SU-340050 Doneck, bulv. Puŝkino, 28, kv. 37 (21-jara, flegistino), pri belartoj, pm. bk.

Junulara Esperanto-Societo el Tallin serĉas kontaktojn kun gesamideanoj en la tuta mondo. Leterojn adresu al TONI HIRSIK, Akadumva tu — 9 Tallinn 200016, Estonio SU.

Paravin S. A. 683019, Petropavlovsk-Kamĉatski, Avtomobilistov, 51—73. laboristo (17-jara): pri lingvoj, fotografado, historio, kol. pm. librojn pri fotado, E-aĵetojn, ĉokoladajn etiketojn ktp.

Kor. kolektive 15—30 jaruloj, tutmonde. SU-292080 Pustomyty, KID, Dom pionerov, ul. Matrosova, Lvovskaja obl. 50 geknaboj (11—16-jaraj) pri ĉt, pm, bk. tutmonde, Respondo certa.

Edgard Homiĉ — 350000 Krasnodar, ab. jaŝĉ 4, — pri muziko, historio, literaturo, esperantaĵoj, bk, ekslibrisoj, kalendaretoj k. a.

Ostapec Jurij, 314028 gorod Poltava ul. Hotkeviĉa 11—6, (16-jara lernanto) pri sporto, muziko, kol. gramof. diskojn, bk.

Belov Aleksandro, 315023 Poltava — Rossoŝinci str. Sevĉenko 4—4, pos. Njeltjanikov, pri ĉt. kun ĉl.

Tatjana Kurepina SU 344007 Rostov--Don 7, ab. k. 29 SU-344007 Rostov-Don 7, Dvorec Pionerov, KID Esperanto-kursanoj kor. tutmonde.

Nikolaj Starodubcev, SU — 340092 Doneck, p. jaŝĉik 618, (40-jara teknikisto) kor. kun ĉl. pri flagoj kaj blazonoj, naciaj vestoj, bk.

Por granda ekspozicio okaze de la glora 110-jara naskiĝdatreveno de Vladimir Iliĉ Lenin Samarkanda Esperanto-klubo de Interpopola Amikeco urĝe petas sendi kernajn ĉiulingvajn materialojn: verkojn de Lenin, fotojn de Lenin-monumentoj, de lokoj, kie li logis, de muzeoj, uzinoj, stratoj, lernejoj portantaj lian nomon, librojn, afiŝojn, poŝtmarkojn pri li kaj nacilingvajn artikolojn de personoj konantaj V. I. Lenin ktp. Ĉiu sendaĵo rekompencota per belaj uzbekaj memoraĵoj!

Bonvolu direkti ĉion al la adreso de la prizorgant^o

Anatolo Ionesov, SU-703000 Samarkando, ul. Sovetskaja 53 Uzbekistano, USSR

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov (Bulgario) — ĉefredaktoro
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
William Gilbert (Francio)
Oldrich Knichal (ĈSSR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Nguyen Hac Trung (Vjetnamio)
Bolek Staszczak (Pollando)

Lingva revizio: **Asen Grigorov** (Bulgario)
Arta aranĝo: **Kiril Drajev** (Bulgario)

La redakcio atendas kontribuadojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La redakcio ne resendadas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI

Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabavka 1, vhod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI, Népköztársaság utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 USSR.

Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 BRUSSEL, Belgio.

Generala sekretario: William Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyôto-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, blok 37, II, 1404 SOFIA, Bulgario.

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, str. Bojanski Vodopad 241E, 1404 SOFIA, Bulgario.

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.

Centra kasisto (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio (Poŝtkonto CCR — Rouen 102-45 P.).

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, Germana DR.

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM Qld, 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200 WIEN AŭS. 100. —

Belgio: Glady Claude, 21 Rue Kessels, 1030 BRUSSEL.
Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM, Louth, Lincs, LN11, OPF. L4—

Bulgario: Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilská 10, 110 00 PRAHA I 30 kronoj.

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRH. 35 d. kr.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 20 DM.

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68, 01610 VANTAA 61. 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle, 11 Cours Léopold, 54042 NANCY—CEDEX (pĝk. 771.77R) 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo, de GDR, Charlottenstr. 60 108 BERLIN 10 DM.

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona).

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 forintoj.

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakuragaoka 1209—98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo: Rufino López, Havana Esp.-Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA I.

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad, N-3135 TOROD.

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugaliao: Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6, R/C A-LISBOA 350 escudo.

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C, ap. 11, R-1900 TIMIȘOARA.

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj.

Usono: James Deer, 11905, SW Settler Way, BEAVERTON Or. 97005. dol. 6,50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.